Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**01-a de aŭgusto 2020, numero 5**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Sukcesa lanĉo de la Virtuala Kongreso

La 1-an de aŭgusto 2020 sukcese okazis la "Solena", kiel oni kutime nomas tiun tradician programeron dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, sed ne malpli bona kaj historia Malfermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto. Pri ĝi vi ankoraŭ multe legos en la Reta Revuo, la revuo *Esperanto* kaj en la aliaj movadaj kaj ekstermovadaj amaskomunikiloj. Vi povas trovi kelkajn ekranfotojn en la kvara paĝo de tiu ĉi numero.

Eĉ se vi maltrafis tiun ĉi grandiozan programeron, vi povas trovi ĝian registraĵon ĉe https://vk.retevent.com.



La Esperanto-himnon *La Espero* plenumis la Virtuala Internacia Koruso.




Kiel parto de la antaŭkongresa programo la 31-an de julio okazis virtuala renkontiĝo kun esperantisto Francisko Lorrain, franckanada kunordiganto de la traduka kaj revizia teamo respondeca pri la aperigo de la plej ĝisdata esperantlingva versio de *La Eta Princo*. La jaro 2020 estas tute aparta jaro, ĉar ĝi markas la 120-an naskiĝdatrevenon de la aŭtoro de tiu ĉi libro Saint-Exupéry. La 31-a de julio estas la datreveno de lia mistera forpaso.

## Valérie Plante salutas VK



Urbestrino de Montrealo, Valérie Plante

S-ino Valérie Plante kiel nuntempa urbestrino de Montrealo (ekde 2017) sendis sian saluton al la Monda Festivalo de Esperanto 2020 pro la Malfermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), kiu okazas samdate al la 105-a Universala Kongreso de Esperanto, planita por okazi en Montrealo kaj nuligita pro la nuna sankrizo. UEA kore dankas al ŝi kaj al la Loka Kongresa Komitato de Montrealo, kiu zorgis pri voĉlegado kaj muntado.

Spektu ĉe jutubo – https://youtu.be/g54yvCVWSgM

## Afrika Tago

Aliĝu kaj partoprenu Afrikan Tagon kadre de MondaFest':
https://forms.gle/1LnjCCLDgFDsiPhF9



## Katalin Kováts invitas vin al sia "budo" en la Virtuala Movada Foiro (ViMF), kiu okazos kadre de la VK

Edukado.net estas sendube la plej grava renkontiĝejo por instruistoj, lernantoj kaj lernmaterialoj de nia lingvo. Ekparolu! estas unu el ĝiaj plej famaj iniciatoj de la lastaj jaroj. Sekvu la inviton de Katalin kaj ĉeestu ŝiajn prezentadojn dum la Virtuala Kongreso.



Kaj ne forgesu spekti kaj ŝati la prezenton de Katalin: https://youtu.be/r-1qwk9BxaE




**Societo Zamenhof**

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe https://uea.org/alighoj


## Ni renkontiĝu en Belfasto!




# Gvidilo al la Celoj por Daŭripova Evoluigo

Gvidilo al la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kompilita de Humphrey Tonkin kaj Rakoen Maertens, baldaŭ aperos libroforme ĉe eldonejo *Mondial* (Novjorko) kaj ĉe la retejo Esperantoporun.org. La verko enhavas 17 eseojn de esperantistoj-fakuloj pri ĉiu el la 17 Celoj aprobitaj de Unuiĝintaj Nacioj en 2015 kiel la tielnomata Agendo 2030 – kvazaŭ laborplano por UN por la periodo 2015-2030. Eldonita okaze de la Virtuala Kongreso de Esperanto, kies ĉeftemo estas "UN 75-jara", la gvidilo ne nur donos al esperantistoj bazajn sciojn pri la Celoj, sed ankaŭ enhavos sugestojn kaj ideojn pri kiel ili povas engaĝi sin, kaj kiel engaĝi lokajn grupojn, landajn asociojn, kaj aliajn Esperanto-rondojn. "Se ni volas atentigi Unuiĝintajn Naciojn pri la internacia valoro de Esperanto, ni faru ion por pruvi, ke ni ne nur parolas, sed ankaŭ agas," diris Humphrey Tonkin responde al nia demando. Ni esperas, ke la gvidilo estos legebla ĉe la reto jam en la unua semajno de aŭgusto.



# Kelkaj programeroj de la Virtuala Kongreso

Sekvu novajn numerojn de la *Festivla Kuriero,* kie ni daŭrigos publikigi la anoncojn.

Internacia Kongresa Universitato estas esenca parto de la UK-oj kaj en 2020 la 73-a sesio de IKU kaj AIS okazos kadre de la Virtuala Kongreso de **#Esperanto**, kun sep nemaltrafeblaj prelegoj. Unu ni jam anoncis en la antaŭa numero aliaj sekvas nun.






















**Internacia Kongresa Universitato.**
**Tutmonde. 73-a sesio. 01 — 08 de aŭgusto 2020.**

Ĉi-jare la unuan fojon IKU-libro estas elŝutebla senpage jam dum la Virtuala Kongreso de Esperanto. La kunredaktoroj kaj eldonejo rifuzis de ajna rekompenco de ilia laboro pri la IKU-libro. Vi povas donaci, omaĝe al tiu ĉi eldono, al la Ĝenerala Kaso de Universala Esperanto-Asocio

# Ni malfermiĝas, ni estas malfermaj al la mondo. La Virtuala Kongreso por vi, por ni kaj por ĉiuj







**Eventa Servo**
estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.